

## Koncernas Skalpon Kaj Uivon

**K**iam la vespero komencis, la atento estis duobligata, kaj kvankam mi devis surposteniĝu nur je la matena krepusko per mia eldirita deziro, ĉar la *indsman*-oj kutime plej ŝate faras iliajn atakojn je tiu tempo, mi ne povis trankviliĝi, kaj mi teniĝis prete por ĉiuj okazigoj.

La nokto kuŝis kviete kaj silente sur la valo, en kies antaŭo brulis la fajro, kaj ĵetis sian tremantan lumon al la ĉirkaŭo. Hatatitla paŝtiĝis en la malhela malantaŭo de la valo. Mi iris serĉi ĝin, kaj trovis ĝin je la rando de la krute supreniĝintaj altaĵoj. Post mi estis doninta al ĝi la kutimajn karesadojn, mi volis iri reen, kiam mallaŭta rumoro aŭskultigis min.

Ankaŭ la virĉevalo levis la kapon. Ĉar la plej eta spiro povis malkaŝi nian ĉeeston, mi ekprenis ĝin je la bridilo, kaj metis la manon sur ĝian nazon. Dum ni ne povis esti facile rimarkata de supre, eblis al mi de malsupre al la pli hela ĉielo vidi ĉiun aĵon, kaj mi klopode serĉis la kaŭzon, kiu estis iginta la falintan ŝtonon de ĝia loko. Unue nenio eminenta rimarkeblis. Verŝajne oni ankaŭ aŭdis la brueton farita de la ŝtono, kaj nun atendis momenton.

Tiu supozo ĝustis, ĉar post mi estis kviete kelkan tempon, mi unue ekvidis plurajn figurojn, kiuj desolviĝis de la malhelaj rokoj, kaj grimpis malsupren. Sed baldaŭ mi rimarkis tutan aron da indianoj, kiuj venis unu post la alia trans la rando de altaĵo, kaj per gardiĝaj paŝoj sekvis la unuan, kiu ŝajne bone konis la lokon, kaj apenaŭ bezonis ankoraŭ nur du minutojn pro atingi la valbazon.

Se mi estus ĉehavinta mian Henry-pafilon, estus estinta facile al mi malsuprenigi lin per unu pafo, kaj doni la urĝokazan signon al la kunuloj samtempe. Li estis la gvido, kaj la aliaj ne povis riski en tiel danĝera areo fari nur unu paŝon plu, se li estus forpafinta. Sed bedaŭrinde mi havis nur la revolverojn en la zono, kiuj ne taŭgis pro longadistanca pafo.

Se mi estus doninta bruegan signon, la malamikoj ja tamen estis suprenigintaj antaŭ helpo povis veni, kaj tiel mi estis en plej danĝera situacio. Ĉar eĉ se mi estus volinta fuĝi, mi tiukaze devis forlasi mian sekuran starpunkton, kaj estus estinta klara celo al la ruĝhaŭtuloj. Tial mi agis laŭ alia plano.

Parranoh — ĉar li ĉiukaze estis la antaŭulo, kiu klare videble iris laŭ sia vojo ne la unuan fojon, nun estis en la proksimo de roka klifo, ĉirkaŭ kiu li devis grimpi. Se mi povis atingi ĝin antaŭ li, li devis veni ĵus antaŭ la tubon de mia revolvero, kaj tial mi ĵusdecide grimpis supren. Kaŝite malantaŭ la rokbloko, kaj kovrite de ĝi, mi trankvile povis oponi al la malamikoj, kaj sendanĝerigi ilin unu post la alia, kiel ili venis.

Mi apenaŭ estis farinta la unuan paŝon, kiam pafo krakis de la akvopordego, tiam pluraj aliaj. Mi tuj ekkonis la intencon de la indianoj, kiuj faris ŝajnan atakon al la aliro, pro dekoncentrigi nian atenton pri la fakta danĝeropunkto. Per duobla hasto kaj klopodo mi tial grimpis supren kaj jam estis tiel proksime al la roko, ke mi povis atingi ĝin per la mano, kiam la malsolida ŝtonaro sub mi loziĝis, kaj mi falis reen malsupren kun la kapo antaŭe de ŝtono al ŝtono, de roko al roko, kaj restis kuŝante senkonscie kelkajn momentojn.

Kiam mi rekapablis pensi kaj malfermis la okulojn, mi vidis la unuajn malamikojn nur malmultajn paŝojn antaŭ mi. Kvankam mi estis ege premita kaj batita, mi salte ekstaris, finpafis la kuglojn de unu revolvero al la malhelaj figuroj rapidavice, saltis sur Hataatila:n kaj rajdegis al la resteja fajro. Mi ne devis igi la ĉevalon en danĝero per forlasi ĝin.

Je la resteja fajro mi saltis de la ĉevalo, sed trovis la lokon forlasita de la ĉasisitoj. Ili estis kunariĝintaj je la eniro, kaj per miaj pafoj nun estis kurantaj ĵus al la direkto, el kiu ili estis aŭdinta la krakojn. Mi estis akceptita de ili per hastaj demandoj.

„La indianoj venas malsupren de la rokoj!“ mi vokis, montrante al la krutaĵo.  
„Rapide al la altaĵoj!“

Estis la sola rimedo saviĝi antaŭ la perejo, kiu minacis al ni per la superforto. Tial mi jam dum mia voko hastis al la kavaĵo, kiu estis estinta mia dormejo. Sed jam estis tro tarde.

La ruĝhaŭtuloj estis sekvintaj ĵus malantaŭ mi, kaj tute kontraŭe al ilia ĝenerala kutimo unue kunariĝi, ili ŝtormis rekte al la ĉasistoj, al kiuj la ĉeesto de la malamiko en la valo estis tiel surpriza, ke ili nur pensis pri defendiĝo, kiam la malamikaj armiloj komencis trakti ilin.

Eble mi estus povinta atingi mian alfuĝejon, sed mi vidis Harry:n, Old Firehand:on kaj Winnetou:n esti atakataj de la malamiko, kaj kuris pro helpi al ili.

„For, for, al la rokmuro!“ mi vokis, iĝante mezen en la batalan ĥaoson, tiel ke la atakantoj iritiĝis, kaj ke ni gajnis sufiĉan spacon pro atingi la orte krutan rokmuron, kie ni estis kovritaj almenaŭ je la dorso. Dum tiu mi estis ŝirinta la milithakilon el la mano de ruĝulo.

„Ĉu tio estu, se mi n'eraras?“ subite vokis voĉo al ni el fendo en la roko, kiu estis ĵus tiel vasta, ke viro povus enpremiĝi. „Nun Sam Hawkens pereos!“

La ruza vireto estis estinta la sola, kiu estis teninta sian pensokapablon, kaj uzis la malmultajn sekundojn pro saviĝi. Bedaŭrinde ni senutiligis liajn klopodojn, per ke ni elektis ĵus la lokon, kiu estis lia kaŝejo, kiel celo de nia cedado. Nun li rapide etendis la manon kaj ekprenis la brakon de Harry.

„La malgranda *Sir* kune eniru en la neston. Estas nur spaco por li, se mi n'eraras.“

La malamikoj estis sekvintaj nin, kaj ŝtormis al ni per sovaĝa fervoro. Tiel ni estis en malbona situacio, kaj devis supozi ĝin esti feliĉero en malfeliĉo, ke la ĉasistoj per la ŝajnatako al la pordego almenaŭ kunhavis ĉiujn armilojn. Certe la pafiloj estis senutilaj en proksimdistanca batalado, sed des pli niaj tranĉiloj kaj milithakilo postulis iliajn oferojn de la ruĝuloj.

Nur Sam Hawkens kaj Harry uzis iliajn pafilojn. Sam ŝargis kaj Harry, kiu sidis antaŭe en la fendo, lanĉis la pafojn, kiuj fulmis el la rokofendo inter mi kaj Old Firehand.

Estis sovaĝa, terurplena batalado, kiun la imago preskaŭ ne povas elpensi. La duon estingiĝinta fajro elsendis sian flagran, malhelan ŝajnon tra la antaŭo de la valo, kie la unuopaj grupoj de la batalantoj siluetiĝis kiel de la infero leviĝintaj diabloj, kiuj disŝiris la karnon unu de alia. En la kriado de la indianoj miksiĝis la instigaj vokoj de la *trapper*-oj kaj la akraj, mallongaj bruoj de la pafilaj pafoj. La tero ŝajnis tremiĝi per la pezaj, piedbatantaj paŝoj de la interbatalantoj.

Ne estis dubo al ni, ke ni estus pereantaj. La nombro de la ponkoj estis tro granda, ke ni povis esperi, ke ni povis defendiĝi kontraŭ ili. Subita ŝanĝo pro nia bono ankaŭ same malpli ekspektindis, same kiel la ebleco fuĝi, kaj tial ĉiu havis la kaŝan konvinkigon, ke li estus tre baldaŭ ĉesonta esti inter la travivontoj. Sed ni ne volis ekmorti vane, kaj same kiel ni komprenis la neŝanĝeblan sorton, same ni defendiĝis per ĉiuj fortoj kaj per tia senindulgeco, kiu donas tian egan superforton al la blankuloj kontraŭ la ruĝaj enloĝantoj de la amerikaj stepoj.

Meze en la sangoriĉa batalado mi pensis pri la maljunaj geedzoj, kiujn mi forlasis en la hejma lando, kiuj ne plu ricevos mesaĝon de la fora filo. Sed baldaŭ mi reenpuŝis tiujn pensojn, ĉar la nuna momento postulis ne nur la plej egan korpan streĉiĝon, sed ankaŭ la plej grandan atenton.

Se mi nur estus havinta mian pafilon, sed tiu ja kuŝis en la ĉambro, kiun mi ne estis povinta atingi. Ĉio estis nur unu fatalo. Mi estis antaŭsciinta, kio okazus. Winnetou konsilis kaj avertis, kaj nun ni devis kunpenti por la eraroj de la aliaj. Min ekregis neniam antaŭe sentita kolero, kaj min kaptis incitego, kiu duobligis miajn fortojn, tiel ke mi uzis la tomahokon per ĉia efikigo.

„Ĝuste, *Sir*, ĝustas tiel!“ ĝi ĉimomente agnoske sonis el la fendo. „Sam Hawkens kaj Vi, tio bone akordas. Domage, ke ni pereas! Kune ni bone estus povonta akiri kelkajn ratfelojn plu, se mi n'eraras, hihihihih!“

Apenaŭ du paŝojn for de mi staris Old Firehand. La maniero, kiel la grandulo plugumis en la vivojn de la alŝtormantaj kontraŭuloj, vekis plej egan admiron en mi. Tute kaj ĉie kovrita per fremda sango, li teniĝis proksime al la muro. La longaj haroj pendis

en kungluitaj aroj de lia kapo. La disigitaj kruroj ŝajnis radiki en la tero, kaj en unu pugno la peza hakilo, en la alia la akra, ete kurbigita tranĉilo li reentenis la alkurantajn malamikojn. Eĉ plie ol mi li estis kovrita per vundoj, sed ankoraŭ ne jam unu el ili faligis lin, kaj ĉiam denove mia vido direktiĝis al lia alta, grandegula figuro.

Tiam ekestis movo en la amaso de la ruĝhaŭtuloj. Parranoh aperis, kaj plugis vojon tra la densa amaso. Apenaŭ ke Old Firehand ekvidis lin, li vokis:

„Finfine mi havas vin! Pensu pri Ribanna kaj ekmortu!“

Finnetey volis kuri preter mi, ŝtormante al li. Mi ekprenis lin je la ŝultro, kaj resvingis pro mortiga bato. Rekonante min, li saltis reen, tiel ke mia tomahoko iĝis tra malplena aero.

„Ĉu ankaŭ vi?“ li kriis. „Vin mi havu vivante. Unu lazo al li!“

Parranoh saltis preter mi, ĵus antaŭ mi povis resvingi la hakilon, kaj dum tio levis la pistolon. La krako pafis. Old Firehand vaste disigis la brakojn, saltis antaŭen per grandega, spasma paŝo meze inter la malamikoj, kaj tiam sensone kolapsis.

Estis al mi, kvazaŭ la kuglo estis iĝinta en mian propran bruston. Mi terenbatis la indianon, pri kiu mi estis okupiĝanta, kaj volis ŝtormi al Parranoh, kiam mi rimarkis malhelan figuron, kiu iĝis tra la malamikoj per serpenta lerteco, kaj rektigis siajn membrojn ĵus antaŭ la murdisto.

„Kie estas la bufo de la atabaskoj? Jen staras Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj, pro venĝi la morton de sia blanka frato kaj la morton de Ribanna!“

„Ha, la hundo de la pimoj, ĉu? Iru al la diablo!“

Mi ne aŭdis pli. La okaziĝo estis streĉiĝinta mian atenton per tiel alta nivelo, ke mi neglektis mian defendiĝon. Maŝo iĝis ĉirkaŭ mia kolo, ektiro — je la sama tempo mi sentis fulmegan baton sur mian kapon, kaj senkonsciiĝis.

Kiam mi vekigiĝis, ĉio malhelis kaj silentis ĉirkaŭ mi, kaj mi ne povis memori, kiel mi iĝis en tiun mallumon. Akra doloro en mia kapo memorigis min fine pri la ricevinta bato, kaj nun la detaloj de la estinteco ariĝis al kompleta kompreno. Al la menciita doloro kuniĝis la turmento, kiu estis kaŭzintaj al mi per la vundoj, kaj krome oni metis la katenojn tiel forte ĉirkaŭ miaj manoj kaj piedoj, ke ili iĝis profunde en mian karnon, kaj ke mi apenaŭ kapablis ian moviĝon.

Tiam mi aŭdis brueton flanke de mi, kvazaŭ homo tusetis.

„Ĉu iu alia estas tie ĉi?“ mi demandis.

„Hm, certe. Tiu viro ja demandas, kvazaŭ Sam Hawkens estus neniu, se mi n’eraras, hihihih!“ la malgrandulo ŝercis, malgraŭ la malbona situacio.

„Ĉu estas Vi, Sam? Nur diru pro Dio, kie ni estas!“

„Laŭdece pakitaj kaj stokitaj, *Sir*. Il’ metis nin en la ledkavon. V’scias, kie ni stokas la felojn, kiujn ni enterigis tiel bele. Sed ili trovu neniun, mi diras, neniun!“

„Kaj kio pri la aliaj?“

„Pli malplie, *Sir*. Old Firehand estas estingita. Bill Bulcher estas estinigita. Jackie Corner estas estingita — ĉiuj fakte *greenhorn*:oj, hihihih. *Greenhorn*:oj, kiel priskribite en libro, se mi n’eraras. Nur Vi ankoraŭ brulas, kaj la apaĉo. Ankaŭ master Harry iomete vivas, laŭ la ŝajno al mi — kaj Sam Hawkens, hm, boneble ili ne jam estingis lin tute, se mi n’eraras, hihihih!“

„Ĉu Vi scias certe kaj fakte, ke Winnetou kaj Harry ankoraŭ vivas, Sam?“ mi demandis tiurilate.

„Ĉu Vi nu pensas, ke tiel maljuna skalpisto ne scias, kion li vidis, *Sir*? Il' metis la *boy*:on tie flanke de ni en la alian truon, kaj Vian ruĝan amikon kune. M'ankaŭ volis iri en tie, sed ne ricevis la rajton pro tio, se mi n'eraras, hihihih!“

„Kiel statas Winnetou?“

„Truo flanke de truo, *Sir*! Aspektos, se li travivos, kiel la aĝa vestaĵo, en kiun ili volvis Sam Hawkens:on tiel gardiĝe: kunkrudite kaj kunigite.“

„Do fuĝo ne estos eble. Sed kiel la ĉefo falis vivante en la manoj de la ponkoj?“

„Same kiel Vi kaj mi. Defendiĝis kiel pagano — Hm, ankaŭ estas pagano, se mi n'eraras, hihihih!“ — Plie volis pereci ol lasi sin rosti sur la fosteno. Sed ne helpis, tamen estis terenbatata kaj preskaŭ disŝirata. — Cetere: Vi ne volas fuĝi, ĉu? Sam Hawkens ege emas pri tio, se mi n'eraras, hihihih!“

„Kion oni faru kun la emo, se tio ne eblas?“

„Ne eblas, ĉu? Hm, tio sonas tute *greenhorn*:e! Estas bonaj homoj, la ruĝuloj, bonaj homoj. Il' prenis ĉion de la olda *coon*, ĉion, la pistolon, la pipon, hihihih, ili miriĝos, kiam ili flaras ĝin: odoras kiel *skunk*! Sed tion ili ja ŝatas — ankaŭ la Liddy estas perdita — la bedaŭrinda Liddy. Kia kojoto do nun prenos ĝin? — Kaj la kapo kaj la kovrilo — ili miros pri la skalpo, hihihih! Ĝi kostis al mi tri dikajn arojn da diksvostulaj feloj tiutempe en Tekama, Vi ja scias ĝin, se mi n'eraras, hihihih. Sed ili lasis la tranĉilon al li, al Sam Hawkens. Estas en la brakumo. La olda ruzulo ĝin enŝovis, kiam li rimarkis, ke la kaŝado en la fendo estis finiĝanta.“

„Vi ankoraŭ havas la tranĉilon, ĉu? Vi ja certe ne povas bone atingi ĝin, Sam!“

„Ankaŭ mia opinio, *Sir*! Vi devus helpi al la filo de mia patrino.“

„Mi tuj venas! Ni vidu, kion ni povos fari en tiu afero.“

Mi ne jam estis komencinta ruliĝi al Sam, la sola moviĝo, per kiu mi povis proksimiĝi al li, kiam la felpordo estis malfermata kaj Parranoh envenis kun kelkaj indianoj. Li tenis torĉon en la mano tiel, ke la flamo lumigis nin. Mi ne klopodiĝis ŝajni senkconscie plu, sed ankaŭ ne honorigis lin per nur unu vido.

„Jen ni ja finfine havas vin!“ li grumblis al mi. „Ĝis nun mi ankoraŭ ŝuldas al vi iomete, sed vi nun ne plu devas plendi pri tio. Ĉu vi konas tiun ĉi?“

Li tenis skalpon antaŭ mia vizaĝo; estis tiu, kiun Winnetou mem estis preninta de li. Li sciis, ke estis mi, kiu estis terenpikinta lin. La apaĉoj ne sciigis lin, pri tio mi certis. Pli verŝajne Winnetou estis respondita ĉiun demandon per digna silentado. Ankaŭ Old Firehand certe estus silentinta dum antaŭaj okazoj. Sed eble Finnetey estis rimarkinta min tiun matenon eble en la krepusko, aŭ vidinta en mian vizaĝon je la momento de nia kunpuŝiĝo. Kiam mi ne respondis, li pluis:

„Vi sciu, kiel ĝi estas kiam oni sentas la tranĉilon, aŭ eĉ kiam la haŭto estas ŝiranta de la kranio! Nur atendu iomete, ĝis la tago estos veninta! Vi havu plezuron per mia dankemo!“

„Tio ne bonos tiel, kiel ŝajnas al Vi!“ Sam Hawkens diris, kiu ne povis sin regi resti silentante. „Mi estus scivolanta, kiun haŭton Vi volas ŝiri de la kranio de Sam Hawkens.“

Vi ja havas la mian en la manojn, estas farita de *hairstylist*, se mi n'eras, hihihhi. — Kiel Vi ŝatis la laborpecon, malnova Jambariko?“

„Nur insultu!“ Parranoh grumbliis. „Vi ja havos ankaŭ alian haŭton, per kiu vi povos esti turmentata.“

Kaj post paŭzo, dum kiu li ekzamenis siajn katenojn, li demandis:

„Vi ja certe ne kredis, ke Tim Finnetey konas vian muskaptilon tie ĉi, ĉu? M'estis en tiu ĉi valo jam antaŭ la — la hundo Firehand estis ekhavinta ideon pri tio, kaj ankaŭ sciis, ke vi estus fikaŝigantaj tie ĉi. Tiu ĉi diris ĝin al mi.“

Li tiris tranĉilon el la zono, kaj etendis la tenilon antaŭ la okulojn de Sam. La malgrandulo faris vidon al la entranĉitaj literoj kaj vokis:

„Ĉu Fred Owins? Hm, ja estis fiulo ĉiatepe! M'dezirus, ke li devis gustumi la ŝtalaĵon mem.“

„Ne zorgu pri tio, *mann*! Li pensis, ke li povus elaçeti sin per la sekreto, sed ne sukcesis. Ni prenis vivon kaj haŭton de li, la sama aĵo, kiu okazos al vi, nur alivice, unue la haŭton kaj tiam la vivon.“

„Faru kion Vi volas. Sam Hawkens pretigis sian testamenton. Destinias la aĵon kiun oni nomas peruko, se mi n'eras. Tre utilos al Vi, hihihhi!“

Parranoh batis lin per la piedo, kaj elpaŝis reen, akompanate de siaj kunuloj.

Kelkan tempon ni restis silente kaj senmoviĝe. Sed tiam, kiam ni sentis nin esti sekure, ni ambaŭ ruliĝis al la alia, tielke ni finfine kuŝis proksime. Kvankam la katenoj estis rigide ligitaj, mi tamen sukcesis tiri la tranĉilon el la brakumo de Sam kaj distranĉi liajn brakokatenojn. Per tio liaj manoj iberiĝis, kaj kelkajn momentojn poste ni staris rekte kun senkatenitajn membrojn vidalvide, kaj frotis siajn per la katenoj surdumigajn korpopartojn.

„Ĝustas tiel, Sam Hawkens. Ŝajnas, ke vi ja ne estas tiel stulta kreaĵo!“ la malgranda viro laŭdis sin mem. „Vi ja jam estis en kelkspecaj malbonaj aferoj, sed neniam ĝi estis tiel malbone kiel hodiaŭ. Urgas al mi ekscii, kiel vi sukcesos iĝi la orelojn el la ĉapo tiun fojon, se mi n'eras, hihihhi!“

„Antaŭ ĉio alia ni vidu, kio okazas ekstere, Sam!“

„Prave, *Mr. Shatterhand*. Tio estas la plej necesa.“

„Kaj tiam ni ege bezonas armilojn! Vi havas tranĉilon, mi estas tute sendefendile.“

„Io certe troveblos!“

Ni paŝis al la pordo kaj iomete disigis la felojn, kiuj estis la kurtenoj.

Kelkaj indianoj ĵus estis tirintaj la du kaptitojn el la najbara kavaĵo, kaj de la restejo Parranoh paŝe alvenis. Ĝi jam estis sufiĉe heliĝinta. Ne malproksime de la akvopordego Hatatitla estis komencinta kverelon kun la de la bedaŭrinda Jackie Corner akirita brunulo, kaj la aspekto de la brava besto tuj rezignigis min pri surpieda fuĝo, kiu estis ĉiukaze plej konsolidenda. Ne tre malproksime de tio paŝtiĝis la Iltŝi de Winnetou. Se ni povus sukcesi haviĝi kelkajn armilojn kaj atinigi la bestojn, estis pli facile ebla al ni fuĝi.

„Ĉu Vi vidas tion, *Sir*?“ Sam Hawkens mallaŭte subridis.

„Kion?“

„Hm, tie transe la maljunan ulon, kiu tiel plezure volviĝas sur la herbaro.“

„Mi vidas lin.“

„Kaj ĉu ankaŭ la aĵon, kiu apogas flanke sur ŝtono?“

„Ankaŭ tion.“

„Hihihih, do ili metas la pafilaĵon rekte sur la vojon de la olda *coon* tiel utiligel! Se mi vere nomiĝas Sam Hawksens, tio ankaŭ estu la Liddy, se mi n'erasas, hihihih. M'taksas, ke la aĵo flanke de ĝi diable similas al mia malnova ĉapelo kaj mia kovrilo. Kaj kuglan saketon la viro certe ankaŭ havas!“

Mi ne povis atentiĝi pri la ĝojo de la malgranda *trapper*, ĉar Parranoh okupis ĉian mian atenton. Bedaŭrinde ne estis eble kompreni, kion li diris al la du kaptitoj, kaj daŭris kelkan tempon, ĝis li foriris de ili. Sed liajn lastajn vortojn, kiujn li parolis per laŭtigita voĉo mi povis aŭdi klare, kaj ili informis min pri la tuto de lia parolado.

„Pretiĝu, pimo! La fosto por vi ĵus estas starigata, kaj vi“ — li pluis kun malamplena vido al Harry — „estos rostata je lia flanko.“

Li faris mansignon al siaj anoj porti la katenitojn al la loko, kie la *indsman*-oj restiĝis ĉirkaŭ la refoje hele flamanta fajro, kaj tiam paŝis reen en dignoplena teniĝo.

Nun gravis agi plej rapide, ĉar ĵus kiam la du estis irigitaj en la mezon de la kuniĝo, estis neniue espero plu veni al ili.

„Sam, ĉu Vi kunestas?“ mi demandis.

„Hm, mi ne scias, se Vi ne scias. Vi ĝin provu, se mi n'erasas, hihihih!“

„Vi okupiĝu pri la dekstra, kaj mi pri la maldekstra! Tiam rapide deigu la rimenojn!“

„Kaj tiam al Liddy, Mr. Shatterhand!“

„Ĉu Vi pretas?“

Sam kapjesis per esprimo je la vizaĝo, en kiu oni povis klare vidi la plezuron pri la ĵus estonta petolaĵo.

„Nu, tiukaze ni eku!“

Per longaj, sed mallaŭtaj saltoj ni rapidiĝis malantaŭ la indianoj, kiuj tiris la kaptitojn malantaŭ ili, kaj ni sukcesis atingi ilin nerimarkite.

Sam terenpuŝis unu el ili per tiel bone farata piko, ke la trafito sensone kolapsis. Sed mi, ĉar mi estis tute senarmile, ŝiris la tranĉilon el la zono de la alia, kaj sendanĝerigis lin per pugnobato sur la tempion.

Kelkaj rapidaj tranĉoj liberigis la katenitojn, tielke ili estis liberaj, ĵus antaŭ la okaziĝo estis rimarkita de ajn iu de la malamikoj.

„Antaŭen, haviĝu armilojn!“ mi mallaŭte diris al la du liberigitaj, ĉar mi sciis, ke senarmila forfuĝo estis tute neeble. Mi ŝiris la pulvosaketon de la korpo de la terenbatito kaj la tomahokon, kaj kuris post Winnetou, kiu per ĝusta prijuĝo de la cirkonstancoj salte kuris ne unue al la pordego, sed rekte al la restantoj ĉe la fajro.

Kiel la homo en momento, kiu koncernas morton aŭ vivon, estas tute alia kiel alie, tiel ankaŭ nun la konsiderado pri tio, kion la ludo priis, donis la necesan lertecon al ni. Jam antaŭ la atakitoj komencis rimarki, kio okazis, ni jam estis kurintaj meze tra ili, kun la deŝiritaj armiloj de ili en la manoj.

„Hatatitla, Hatatitla!“ mi vokis al la virĉevalo, saltis sur ĝin momenton poste, vidis Winnetou:n salti sur sian Iltŝi:n, kaj Hawksens:on sur la unue haveblan ĉevalaĉon.

„Supren al mi, pro la ĉielo rapide!“ mi postulis al Harry, kiu vane provis iĝi sur la brunulon de Finnetey, dum la ĉevalo defendiĝis laŭforte. Mi ekprenis la brakon de la knabo, ŝiris lin supren al mi kaj direktiĝis al la eliro, tra kiu Sam ĵus malaperis.

Estis momento de la plej alta instigo. Kolera kriado plenigis la aeron, pafoj krakis, sagoj siblis preter ni, kaj intere sonis la piedbatojn kaj la blekado de la ĉevaloj, sur kiujn la ruĝuloj saltis pro persekuti nin.

Mi estis la lasta de ni tri, kaj neeble povas diri, kiel mi atingis la liberon tra la mallarĝa, kurba transiro sen esti atingita de malamikoj. Sam Hawkens ne plu estis videbla, Winnetou flankiĝis dekstren en la valon, laŭ kiu ni estis rajdintaj supren kelkajn tagojn antaŭe je nia alveno, kaj dum tio vidis reen, ĉu mi sekvis lin.

Ni ĵus estis alflankiĝantaj, kiam pafo krakis malantaŭ ni. Mi sentis, kiel Harry ekspasmis. Li estis trafita.

„Hatatitla, mia Hatatitla rapidiĝu!“ mi vigligis la beston per granda afliktiĝo, kaj per la sama rapidega kurado kiel tiutempe dum la brulego de New Venango la virĉevalo fulmis antaŭen.

Kiam mi turnis mian kapon, mi vidis Parranoh:n sur sia mustango proksime malantaŭ mi. La aliaj estis kaŝitaj al mi per la kurbiĝoj de la vojo. Kvankam mi povis fari nur mallongan vidon al la persekutanto, mi tamen rimarkis la koleran furiozecon, per kiu li intencis atingi nin, kaj mi duobligis miajn vokojn al la brava besto, de kies rapideco kaj eltenkapablo pendis ĉio. Ĉar mi ja certe ne timis pri interbatalo kun la kolera viro, mi sede estis malhelpata per la knabo je ĉiu libera moviĝo, kaj povis fari nenion sed iĝu antaŭen.

Kiel tempesto ni rapidis laŭ la fluo de la akvo. La nigra ĉevalo de Winnetou ĵetis la maldikajn membrojn for de si, per ĉiu forto, tiel ke la maldensa ŝtonaro estis vera ŝtona pluvo malantaŭ si. Hatatitla kuris samrapide kiel ĝi, kvankam li devis porti preskaŭ la duoblan ŝarĝon. Tamen mi sciis, kvankam mi ne plu vidis reen, ke Parranoh restis proksime malantaŭ ni; ĉar la paŝoj de lia brunulo aŭdeblis en ĉiama proksimeco.

„Ĉu Vi estas lezita, Harry?“ mi demandis timplene dum la rajdego.

„Jes.“

„Ĉu danĝere?“

La vivovarma sango fluis el lia vundo trans mia mano, kiu tenis la korpon de la knabo. Li estis tro kariĝinta al mi, ke lia sorto ne estis tuŝinta mian koron per la plej vigla aflikto.

„Ĉu Vi povos elteni la rajdadon?“ mi pludemandis, sen atendi respondon al la antaŭa demando.

„M'esperas.“

Mi instigis la virĉevalon al ĉiam pli ega kurado. Kiel fulmo ĝi flugis antaŭen. Ĝiaj hufoj ŝajnis apenaŭ tuŝi la teron.

„Nur firmtenu, Harry! Ni jam estas duone saviĝintaj.“

„La vivo ne gravas al mi“, li respondis feble. „Ĉiukaze lasu min, se mia pezo malhelpas al Vi forfuĝi.“

„Ne, ne, Vi vivu! Vi havas rajton pri tio!“

„Nun ne plu, kiam la patro mortas. Mi volus, ke mi estus mortiginta kune kun li.“  
Sekvis paŭzo, dum ni pluis nian rajdegon, aŭ plie flugadon.

„Mi kulpas pri lia morto“, la knabo nun akuzis sin mem. „Se mi estus aginta laŭ Via konsilo, Parranoh estus terenpafita en la ‚citadelo‘, kaj la *indsman*-oj ne estus mortigitaj la patron!“

„Silentu pri la okazitaĵoj! Ni agu nun en la estanteco!“

„Ne, lasu min fali! Parranoh haltos, kaj ni povas iomete senstreĉiĝi.“

„Do ni provos tion!“

Rajdegante mi vidis malantaŭen. Jam delonge ni estis forlasintaj la akvofluon, kaj estis alflankigitaj sur la liberan ebenaĵon, trans kiu ni flugis antaŭen paralele al la arbara rando maldekstre. Parranoh nun estis malproksimiĝinta malantaŭen sufiĉan distancon, kaj Hatatitla pruviĝis esti ege supera al la brunulo. Malantaŭ la blanka ĉefo, unuope aŭ en malgrandaj aroj rajdegis la indianoj, kiuj ne volis rezigni pri la persekuto, kvankam ni gajnis ĉiam pli foran antaŭiĝon.

Kiam mi returniĝis antaŭen, mi vidis, ke Winnetou estis saltinta de la ĉevalo kaj staris malantaŭ sia nigraĉevalo. Li ŝarĝis la akiritan pafilon. Ankaŭ mi haltigis mian virĉevalon. Mi lasis Harry:n gliti malsupren, mem deĉevaliĝis kaj metis Harry:n sur la herbaron. Pro ŝarĝado mi ne plu havis tempon; ĉar Parranoh jam estis tro proksime. Tial mi salte restariĝis kaj ekprenis la tomahokon.

La persekutinto certe rimarkis miajn moviĝojn, sed lasis sin regi per sia kolero kaj ŝtormis al mi, svingante la milithakilon. Tiam krakis la pafo de la apaĉo. La malamiko ekspasmis kaj falis, samtempe trafita de mia armilo, de la ĉevalo kun profunda disigo en la kranio.

Winnetou alvenis kaj turnigis la senvivan korpon per la piedo.

„La serpento de la atabaskoj ne siblos plu aŭ blekos al la ĉefo de la apaĉoj per la nomo pimo. Mia frato reprenu sian armilon!“

Fakte la mortulo kunhavis tranĉilon kaj revolveron de mi, kaj unu el miaj pafiloj. Haste mi prenis miajn posedaĵojn kaj resaltis al Harry, dum Winnetou iris kapti la brunulon.

La ponkoj intertempe estis tiel proksimiĝintaj al ni, ke ili jam preskaŭ povis atingi nin per iliaj kugloj. Ni resurĉevaliĝis, kaj per denova rapideco ni ekrajdis plu.

Tiam subite ĝi fulmis maldekstre de ni hele kaj brile kiel la brilo de armilo. Sufiĉe granda aro de rajdantoj rapidis de la arbara rando inter ni kaj la persekutantoj, direktiĝis al la ruĝuloj, kaj ŝtormis al ili per plena galopo.

Estis la trupo de dragonoj de Fort Randall. Ilia alveno je la ĝusta tempo ne estis nura hazardo, kiel ni eksciis ĝin pli poste. Dick Stone kaj Will Parker estis renkontintaj ilin sur la duona vojo al la fortikaĵo. La dragonoj estis elrajdintaj kelkajn tagojn antaŭe pro puni la ponkojn pro la atako de Fort Niobrara. Dum tio ili estis trovintaj la spurojn de la ruĝuloj, kaj sekvis ilin. Kion ili tiam ekkonis de la du okcidentuloj, igis ilin fari egan fortrajdadon. Dick Stone kaj Will Parker ekgvidis la trupon kaj estis hastintaj tien ĉi sur la direkta vojo, sen plu atenti la spurojn de la ruĝuloj.

Pro tiuj konsideroj ni nun memkompreneble ne havis la tempon. Apenaŭ, ke Winnetou estis vidinta la helpantojn, li ŝiris sian ĉevalon reen, rapidis preter ilin, kaj

kun resvingita tomahoko rekte inter la ponkojn, kiuj apenaŭ havis la tempon ĉesigi la kuradon de iliaj ĉevaloj. Mi sed deĉevaliĝis pro ekzameni la vundon de Harry.

Ĝi ne estis danĝera. Mi prenis la tranĉilon, kaj detranĉis, ĉar ja nenio alia estis uzebla al mi, strion de mia ĉasvesto, per kiu mi provizore haste bandaĝis la knabon, pro almenaŭ ĉesigi la sangofluon.

„Ĉu Vi povos rajdi, Harry?“ mi tiam demandis.

Li kapjesis kaj paŝis al la brunulo, kies bridiloj Winnetou estis doninta en mian manon preterpasinte. Per mia helpo Harry iĝis en la selon.

„Nun, kiam la sango ne plu fluas, mi tute ne plu sentas la vundon“, li deklaris. „Tie la ruĝulpj fuĝas. Antaŭen, post ili, *Sir!*“

Estis kiel li diris. Perdiginte ilian estron, kies alvoko estus instigintaj ilin aŭ almenaŭ postulinta ilian cedon, ili nun rajdis rapide, kun la dragonoj ĉiam en iliaj plej malantaŭaj vicoj, reen laŭ la vojo, sur kiu ni estis venintaj. Do estis supozinda, ke ili volis trovi saviĝon en nia valo.

Nun ni denove rapidigis niajn ĉevalojn, rajdegis preter la falintaj indianoj, kaj atingis per la rapideco de niaj ĉevaloj la soldatojn ankoraŭ sufiĉan distancon for de la akva pordego.

Estis tre grava, ne lasi la ruĝulojn establiĝi en la roka kurbaĵo, sed eniĝi tie kune kun ili. Tial mi pelis Hataatila:n trans arbusto kaj dornaĵo, trans radiko kaj ŝtono preter la tuta aro de la persekutantoj, kaj baldaŭ estis je la flanko de Winnetou, kiu rajdis rapide ĉiam malantaŭ la fuĝantoj.

Nun ili alflankiĝis al la pordego, kaj la unua ĵus estis volanta irigi sian ĉevalon en la mallarĝaĵon, kiam krakis pafilo el la kanjono. La ruĝulo falis senvive de la ĉevalo. Tuj krakis dua pafilo. La neksta estis deĉevaligata, kaj ĉar la ektimigataj *indsman*:oj trovis la eniron barita per tiu maniero, kaj vidis samtempe, ke ni estis embuskintaj ilin, ili ekhastis flanken al la Mankizita kaj fuĝis, ĉiam persekutate de la dragonoj, laŭ la rivereto.

Ne malpli granda ol la surpriziĝo de la malamikoj ankaŭ estis miriĝo pri la pafiloj, kiuj helpis tiel forte al nia klopodo, aŭ plie ne plu necesis ilin. Sed mi ne longe plu estu nekonanta la bravan pafinton, ĉar la piedbatoj de la forrajdintoj ne jam estis mallaŭt-iginta, kiam gardiĝe videbliĝis el arbaraĵo el hirtaj barboharoj grandega nazo, kaj supre de tio brilanta okulparo malantaŭ la rokeĝo, kaj ĉar neniu malamikeca ulo estis rimark-eble, la aliaj korpopartoj antaŭenŝoviĝis fidoplene post la elstara flarilo.

„Benu miajn okulojn, *Sir!* Kiu pafilo nu ankaŭ Vin pafis Vin reen tien ĉi, se mi n'erasas?“ la malgranda viro demandis, same mirigite pri mia aspekto kiel mi pri lia.

„Sam, ĉu estas Vi?“ mi vokis ĝoje. „Kiel Vi venis en la pordegon? Mi ja vidis vin forrajdi per miaj propraj okuloj!“

„Ĉu forrajdi, *Sir?* Dankon pro la rajdado! Estis aĉa fiĉevalo, kiun mi akiris. Tute ne volis ekkuri, kaj tiel skuigis siajn maljunajn ostojn inter la kruroj, ke tiuj de la olda *coon* preskaŭ estus disiĝintaj, se mi ne estus lasinta kuri la stultan ĉevalon sen mi. Tiam mi kaŝiris reen. Mi pensis, ke ĉiuj ruĝuloj estus malantaŭ Vi, kaj lasis la ‚citadelon‘ malplene. Mi ankaŭ trovis tion. Certe ili ege miriĝis, kaj faris mienaĉojn, se mi n'erasas, hihihih! Sed — *bless my soul* — jen ja ankaŭ reestas niaj du grandaj infanoj, nomataj Dick kaj Will, se mi n'erasas! Bone, ke Vi iĝis ĝustatempe el la suprenĵetita polvo, ali-

kaze Vi nun ankaŭ estus en la supreniĝinta, kaj mi ne plu havus iun, pri kiu mi povus ĉagreniĝi. Ĉar tiajn *greenhorn*-ojn kiel Vi mi neniam retrovos, se mi n'eraras, hihihih!

„Maljuna rano, ĉesu Vian blekadon!“ Will Parker diris kvazaŭ indigne. Li estis disiĝinta kun Dick Stone de la dragonaro, kaj estis veninta malantaŭ mi. „Pli bone danku al ni, ĉar se ni ne estus alvenigintaj la armeulojn tiel rapide, Vi ne estus fartonta tre bone en la estonta tempo. Sed tiel ni savigis Vin.“

„Tion mi ne pensas“, la malgrandulo kontraŭis. „Old Shatterhand, Winnetou kaj Sam Hawkens estas homoj, kiuj kapablas savigi sin mem. Sed pro doni jarlongan pripensaĵon al tiuj ponkoj, pro tio tiuj viroj venis ĝustatempe. Ĉu Vi pensas, *Sir*, ke ni rajdu rekte malantaŭ ilin?“ li tiam turniĝis al mi.

„Kial? Ili kapablos dece trakti la *indsmar*-ojn ankaŭ sen ni. Tion pensis ankaŭ Winnetou, ĉar li jam rajdis kun Harry en la ‚citdelon‘. Ni ankaŭ enrajdu kaj vidi al niaj mortuloj!“

Kiam ni estis pasintaj la eniron kaj alvenis en la sinistran valon, ni vidis je la loko, je kiu la batalado estis okaziĝinta en la pasinta nokto, Winnetou:n kaj Harry:n okupiĝantaj ĉe la korpo de Old Firehand. La ploranta knabo tenis la kapon de sia patro inter la kruroj, kaj la apaĉo ekzamenis la pafovundon. Ĵus kiam ni paŝe alvenis, ni aŭdis la voĉon de Winnetou:

„Uf, uf! Li ne jam mortas — li vivas!“

Tio estis vorto, kiu iĝis tra niaj korpoj kiel bato. Harry hele ĝojkriis per feliĉo. Ni partoprenis en la klopodoj de la apaĉo, kaj vere havis la kontenton vidi, ke Old Firehand malfermis la okulojn post kelka tempo. Li rekonis nin, kaj donis etan rideton al sia filo. Sed li ne povis paroli, kaj lia konscio tiam ankaŭ resvenis. Mi ankaŭ ekzamenis lin. La kuglo estis iĝinta je la dekstra flanko antaŭe en la pulmon, kaj eliĝinta malantaŭe, tre danĝera vundo, kaŭzinte grandan sangoperdon. Sed malgraŭ, kaj kvankam Old Firehand estis lezita nur mallongan tempon antaŭe dum la atako al la fortikaĵo, mi konsentis pri la opinio de la apaĉo, ke la lezito estis savigebla pro lia elstare robusta konstitucio per zorga flegado. Li estis bandaĝata per la elprovita maniero de Winnetou, kaj ricevis tiel komfortan restejon, kiel la loko kaj la cirkonstancoj permesis ĝin.

Tiam ni povis pensi pri ni mem. Neniu el ni estis sen vundoj, kaj tiel ni kunflikumis unu la alian ajn kiel ĝi eblis. Sed ne malmultaj el ni certe pagis la malatenton pri mia averto per la vivo.

Je la tagmezo la dragonoj revenis. Ili estis pelintaj la ponkojn al arojn, kaj ne perdintaj unu viron dum tio. La komandanta oficiro ĝojis konatiĝi al mi kaj Winnetou. Li jam konis Old Firehand:on de pli mallonga tempo. Pro ripozigi la ĉevalojn, li restis kun la trupo tri tagojn en la valo. Dum tiu tempo la mortuloj estis enterigataj, tiam oni invitis nin transporti Old Firehand:on, tuj kiam li povis elteni la vojaĝon al Fort Randall, kie li trovus sufiĉan flegadon, kaj antaŭ ĉio ankaŭ decan kuracistan traktadon. Ni ŝate konsentis.

Ke Sam Hawkens, Dick Stone kaj Will Parker tree malĝojis pri la morto de tiel multaj amikoj, tio ne menciendas. La malgranda Sam ripete asertis, ke li estonte volis mortpafi ĉiun ponkon, kiu estos sur lia vojo. Sed mi juĝis alie ankaŭ pri tiu ĉi kazo: Parranoh estis blankulo. Tiel mi do denove ekhavis certigon de mia delonga sperto, ke la indiano estiĝis, kion li estas hodiaŭ nur per la palvizaĝoj.